Arûŝo dimanĉon, la 4-an de aŭgusto 2024 numero **2**

# La Voĉo de Kilimanĝaro

Kongresa Kuriero de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto

## Internacia Jurista E-Asocio

En la Dua Bulteno kaj en la Kongresa libro aperis erare sub "Vivo de la Asocio" la titolo de la prelego de Miguel Faria de Bastos, kiu okazos lunde, la 5-an de aŭgusto, matene inter 09:00-10:30 en la salono Čeliauskas dum la asemblea kunveno de IJEA-Juristoj kaj la asemblea kunveno de UIAE-advokatoj. La ĝusta titolo de lia prelego estas **Tutafrikaj Internaciaj Tribunaloj**.

## Partoprenu Lingvan Defion

Ĉu vi akceptus la defion lerni la svahilan lingvon en nur malmultaj tagoj? Nun vi havas la okazon, kaj eblas gajni premiojn! Ĉu vi pretas? Por formale partopreni, bonvole anoncu vin per la formularo ĉe *https://mallonge.net/defio*.

Bonŝancon al vi! Bahati njema!




## La IKU-libro & Programo de la prelegoj de IKU kaj Scienca Kafejo

Jam pli ol dum du jardekoj la Internacia Kongresa Universitato (IKU) eldonas la IKU-libron. Ekde 2005 la libro peras ankaŭ en la reto *https://uea.org/teko/IKU/*.

Malgraŭ la malfacilo havi kiel eble plej multe da prelegantoj el Afriko kaj temoj rilataj al Afriko, la rezulto ĉi-jare tamen estas tiurilate tre kontentiga. Kun pli ol cent paĝoj, la arûŝa IKU-libro estas tamen kuraĝiga. Kun 11 IKU-prelegoj kaj 3 AIS-daŭrigaj prelegoj, verkita kaj pretigita laŭ altaj sciencaj kaj eldonaj normoj, la libro estas grava atingo en Esperanto el la scienca vidpunkto.

Partoprenantoj de la 109-a UK havas eblon akiri la IKU/SUS-libron kontraŭ la speciala prezo. La IKU-libro estas aĉetebla en la Libroservo de UEA kaj ĉe la IKU-prelegoj.

| TAGO | HORO | SALONO | PRELEGANTO | SPECO | PAĜO | TITOLO DE LA PROGRAMO |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | |
| Dim. | 13:00 | *Zamenhof* | Amri Wandel | IKU-Inaŭguro | 4 | |
| Dim. | 13:30 | *Zamenhof* | Amri Wandel | IKU-AIS 1 | 16 | Astrofiziko por Laikoj |
| Dim. | 14:30 | *Lala* | Horst Gruner | IKU 5 | 65 | La Berlina Kongreso pri Afriko en 1884 kaj sekvoj |
| | | | | | | |
| Mar. | 09:00 | *Lala* | Jesper Jacobsen | IKU 6 | 68 | La Mpemba-efiko (registrita) |
| Mar. | 10:15 | *Lala* | Elise Byelongo | Scienca Kafejo 1 | 86 | Ercoj en la Sudafrika disvolvighanta komunumo |
| Mar. | 10:45 | *Lala* | Ĵoël Fontaine | Scienca Kafejo 2 | 101 | Terapio pere de lumo |
| Mar. | 11:15 | *Lala* | Anny J. Nizigiyimana | Scienca Kafejo 3 | 114 | Koncepto de mediprotektado |
| Mar. | 11:45 | *Lala* | Arno Lagrange | Scienca Kafejo 4 | 129 | Stefan Zweig, eŭropa verkisto (registrita) |
| Mar. | 12:45 | *Lala* | Heidi Goes | IKU 4 | 48 | Vokalharmonio en la Konga Lingvo-Areto |
| Mar. | 14:00 | *Lala* | Maciej St. Zięba | IKU 2 / AIS 1 | 31 | Afrika filozofio hodiaŭ kaj estonte |
| Mar. | 15:15 | *Lala* | Orlando Raola | IKU 3 / AIS 1 | 74 | Datado de la fosilia registro: la homara lulilo? |
| | | | | | | |
| Ĵaŭ. | 10:30 | *Ferenczy* | Amri Wandel | IKU-AIS 1.2 | 16 | Astrofiziko por Laikoj (2) |
| Ĵaŭ | 12:00 | *Ferenczy* | Maciej St. Zięba | IKU-AIS 2.2 | 31 | Afrika filozofio hodiaŭ kaj estonte (2) |
| | | | | | | |
| Ven. | 13:00 | *Ferenczy* | Orlando Raola | IKU-AIS 3.2 | 37 | Datado de la fosilia registro: la homara lulilo? (2) |
| Ven. | 14:15 | *Ferenczy* | Gilbert Niyukuri | IKU 7 | 74 | Denaska malario |

## La Bankedo

Lunde, la 5-an de aŭgusto – do morgaŭ, je la 18:30 komenciĝos la programero en la salono Sao. Ĉi-jare alia versio de la tradicia lunda programero atendas kongresanojn! Anstataŭ la kutima bankedo rezervita nur por antaŭmenditoj, ĉi-foje estas planata vespero kun manĝoj kaj trinkaĵoj por ĉiuj kongresanoj. La celo estas krei festenan vesperon, kie ĉiuj kongresanoj povas renkontiĝi, konatiĝi pli bone, kaj bonetose prepariĝi por la tuj baldaŭa Kongresa Balo.

## La Kongresa Balo

Ĝi dancigos ĉiujn kongresanojn – kaj por tion fari estis ĉi-foje elektitaj eminentaj muzikistoj: Abel, Joel kaj ¡OmO! Kaj eble aldoniĝos eĉ kelkaj aliaj. Ili muzikumos iom aparte, iom kune por krei la ĝustan balan etoson, plenan de gajo, dancado kaj kunkantado. Ĉiuj tri ludos siajn apartajn koncertojn dum ĉi-UK, kiujn ni ankaŭ varme rekomendas partopreni! Kaj eĉ se ili hazarde laciĝus… ni daŭrigos kun DĴ-muziko de la tutmonda kantokolekto, kiu celos eluzi la lastajn danco-minutojn de la balo! Do nepre ne maltrafu la okazon – vestiĝu bele, pretigu firmajn ŝuojn kaj ŝparu dumtage energion, por danci "ĝis la nokto-nokto fin´"! Venu al la Kongresa Balo je la 18:30 en la salono Sao. Ni ĝojos vidi vin tie!

## Mergado en Masaja Kulturo merkrede!

Se vi ne mendis ekskurson merkrede la 7-an de aŭgusto, vi povas iri renkonte al masajoj. Temas pri unika kaj riĉiga sperto: mergo en la Masaj-kulturon! Aliĝu por malkovri la fascinajn tradiciojn, kutimojn kaj vivstilon de ĉi tiu ikoneca popolo de Orienta Afriko. Dum ĉi tiu tago, vi havos la ŝancon:

- Partopreni en ateliero pri manfaritaĵoj
- Lerni tradiciajn dancojn kaj kantojn
- Malkovri la ritojn kaj valorojn de la Maasai-komunumo
- Gustumi lokan kuirarton, zorge kuirita de la tribanoj.

Kolektiĝo okazos antaŭ la kongresejo je la 7:30 kaj enbusiĝo kaj foriro 8:00. La ira busvojaĝo al la hejmvilaĝo de masajoj – Lengijape daŭros ĉ. horon. Partoprenkotizo por unu persono estas 35USD. El tiu kotizo 5 USD estos destinata por subteni la Esperanto-agadon en Tanzanio.
La enskribiĝo kaj registrado okazas ĉe Francis Gendo en la ĉambro 218[1] kaj tio daŭros ĝis estos finitaj la lastaj liberaj lokoj.
Venu kun malferma menso kaj preta dividi aŭtentikajn momentojn kun la Maasai-komunumo. Ĉi tiu mergo estas bonega ŝanco lerni, interŝanĝi kaj festi la riĉecon de kultura diverseco. Ni esperas vidi multajn el vi por ĉi tiu escepta aventuro! Tiun ĉi aranĝon subtenas kiel sponsoroj la Telefonprovizanto TIGO kaj NMB-Banko kiel sponsoroj.

[1]Post la enirkontrolo dekstre staras la konstruaĵo Ngorongoro – eniru kaj tuj maldekstre estas lifto. Ĉe la 2-a etaĝo funde de la koridoro estas la ĉambro 218.


## Zamenhof *ba ya jin Hausa*
## Zamenhof ne parolis la haŭsan

Li ankaŭ ne parolis la suahilan, sed produktis Esperanton, kiu havas multon komunan kun la suahila. Sed la haŭsa lingvo estas io tute malsama.
Mia enkonduko al la haŭsa okazis pro tio, ke profesoro pri la haŭsa en la universitato en Napolo, Sergio Baldi, estis esperantisto en sia juneco. Nun, emeritiĝinta, li pensis realigi sian viv-longan revon, aperigi resumon de sia vortaro haŭsa-itala en Esperanto. Pro tio li retrovis malnovan esperantistan amikon, min, por helpi lin kaj jen mi devis rapide provi kompreni la sistemon de la haŭsa lingvo por redoni aferojn en ĝusta Esperanto. Kaj jen Sezamo malfermiĝis kaj mi malkovris nekonatan Afrikon, neesploritan de mi sed ankaŭ de la tuta E-movado.
Temis pri tiom da lingvaj fenomenoj, kiujn oni povus nomi "la paradizo por lingvistoj kaj la infero por lingvolernantoj". Mi donas al vi nur kelkajn ekzemplojn:
- la vortoj estas inaj kaj viraj pro la deveno el azia-afrika lingvo-grupo [komparu kun la araba]
- la vokaloj estas mallongaj kaj longaj, ree komparu kun la araba.
- la vortoj havas tonojn kiel la ĉina kaj aliaj okcidentafrikaj lingvoj
- la frazoj havas ton-ĉenoj de kiuj dependas la signifo
- laŭ konata lernolibro vi ne lernu la sistemon de la plurnombre, sed ĉiujn pluralojn unuope.
- la verboj havas tempojn kaj aspektojn.
- la pronomoj havas la distingon viran/inan ankaŭ en la dua persono, kiel en la araba, sed krome ili havas la taskon kunligiĝi kun morfemoj, kiuj indikas la aspektojn de la verbo, kiu en si mem ne estas konjugaciata.

Ni povas konkludi, ke bonŝance Zamenhof ne parolis la haŭsan. La vortaro fine aperis ĉi-jare ĉe *Mondial* en Novjorko kun la titolo: *Sergio Baldi, Vortaro Haŭsa-Esperanto-Haŭsa kaj Esperanto-Haŭsa.*

**Venu marde 13:30-14:15 ĉeesti la prezenton de Renato Corsetti, en la salono *Čeliauska*, por pli lerni pri la temo.**

## Vortaro Haŭsa-Esperanto




Ĉi tiu verko estas la unua vortaro en Esperanto pri okcidentafrika lingvo. Ĝi estas la rezulto de la kunlaboro inter Sergio BALDI – emerita profesoro de la haŭsa kaj de sudanaj lingvoj, kiu ĉefe okupiĝis pri arabaj kaj portugalaj pruntvortoj en afrikaj lingvoj – kaj Renato CORSETTI, psiĥolingvisto kaj membro de la Akademio de Esperanto.
Krom la vortarojn Haŭsa-Esperanto kaj Esperanto-Haŭsa, la libro enhavas enkondukojn pri ambaŭ lingvoj, notojn pri prononcado, rakonton en la Haŭsa kaj ĝian Esperantan version, kaj liston de mallongigoj.

## La Kleriga Lundo

Dato: **lundon, la 5-an de aŭgusto**
Salono: **Zamenhof** (Simba Plenary Hall)

### Programo:

### 09h – 10h30

Marija Belošević Kulturo kaj naturo:
*Kroata heredaĵo en Uneskolistoj.*

Rakoen Maertens:
*La psikologio de falsaj novaĵoj: Kiel protekti sin kontraŭ la influo de misinformoj.*

Ana Montesinos:
*Klerigaj Ludoj dum Klerigaj Lundoj.*

### 10h45 – 12h15

Terana kaj Longarko:
*La ĉina Granda Kanalo.*

Anny Joanice:
*Burunda tradicia kulturo.*

Patrick Manirakiza:
Via telefono kiel fonto de enspezo.

### 12h30 – 14h00

Kristin Tytgat, Duncan Charters:
*Esperantistoj: ĉu kulture kompetentaj?*

Istvan Szabolcs:
*Budapeŝta Skolo – Literatur(ec)a vojaĝo – kaj rememoro pri Istvan Szerdahelyi.*

Iratwibuka Jean Marie:
*Evoluo kaj uzo de Artefarita intelekto.*



Dum la Movada Foiro. Fotis: **Martina Sachs-Bockelmann**, KN 248

## Saluto de Humphrey Tonkin

Kara Prezidanto, karaj kongresanoj,



La fakto, ke la Universala Kongreso de Esperanto kunvenas en la jaro 2024 en Tanzanio estas okazo por vera entuziasmo. Mi gratulas la organizantojn, kiuj laboris tiel diligente kaj celkonscie, kaj la partoprenantojn, kiuj respondis al la alvoko al partopreno. La kongreso montras, se ankoraŭ necesas montri, ke Esperanto estas tutmonda fenomeno kiu promesas pacon, interkomprenîĝon kaj daŭripovan evoluon por ĉiuj homoj. Esperanto estas lingvo de paco, kiu unuigas la homaron en reciproka respekto.

Ne temas pri ia malplena idealismo, sed pri praktika klopodo unuecigi la mondon en spirito de urĝa kunlaboro.

Mi forte bedaŭras, ke mi ne estas inter vi, sed deziras al la kongreso sukceson, progreson kaj reciprokan konfidon. Vivu Esperanto! Vivu Afriko! Vivu paco, amikeco, kaj interkompreno!

**Humphrey Tonkin**

## Esperanto+ dum la Movada Foiro



**Fotis Amalia**

Jam ĉ. 4 jarojn funkcias Esperanto-Plus kiel kunlaboranta asocio de UEA. Hieraŭ dum la Movada Foiro, Nicolas Gaufillet, la sekretario kaj Adjévi Adjévi subtenato de la asocio, prezentis pri agado de la asocio. La prezento konsistis el ĝeneralaj informoj pri la asocia vivo, raportoj pri agado de subtenatoj, atingoj, projektoj, distribuo de flugfolioj kaj ekzempleroj de la revuo *Afrika Esperantisto* al la vizitantoj, kiuj tion deziris ricevi. La programero mem okazis ĉe la Korto Hans Bakker per partopreno de cento da landaj, fakaj asocioj, kulturaj centroj, eldonejoj, edukaj instancoj kaj multaj aliaj. Ĝi celis doni impreson pri la vasteco kaj vario de la Esperanto-movado.

**KN 398**

## Liberkostaj pageblaj libroj

El Esperanto-gastejo de Lesjofors, Svedujo, venis Esperanto-libroj al UK por disdoni al afrikanoj diverslandaj. La libroj estas diversgrandaj, diverstemaj, diversaĝaj kaj diversdevenaj. Venu al la oficejo de LKK en la ĉambro numero 218 en la konstruaĵo Ngorongoro. Elektu unu libron por vi mem, pagu tiom kiom vi povas, registru vian aĉeton kaj la libro estas la via. La kolektata mono estos por subteni la afrikan Esperanto-movadon.

**Martin Strid**, Kn 415

Post la enirkontrolo de la kongresejo dekstre staras la konstruaĵo Ngoron-goro – eniru kaj tuj maldekstre estas lifto. Ĉe la 2-a etaĝo funde de la koridoro estas la ĉambro 218.

## La Nacia Vespero

Pro la veterprognozo kaj komforto de kongresanoj estis decidite lastmomente ŝanĝi la lokon de la Nacia Vespero al la plej proksima. La Nacia Vespero fine okazos en la Kongresejo – en la du grandaj manĝtendoj super la Korto Hans Bakker. La programero konsistos el tipaj afrikaj kaj regionaj manĝoj, inkluzive de rostado kaj estos akompanata de la viva muziko. Nepre ne maltrafu ĝin. Se vi havas jam tipajn tanzaniajn aŭ afrikajn vestaĵojn, ni kuraĝigas vin survesti ilin por la Nacia Vespero. Krom la komuna bunta vespermanĝo atendos vin arta programero.




## Funkcianta sendrata Interreto

Sendrata senpaga Interreto en la kongresejo jam funkcias! Inter vifioj serĉu "Esperanto_AICC 2024" – la pasvorto por ĝi: "Zamenhof". Uzu tamen nur por retpoŝto kaj komuniki, ĝi ne taŭgas por elŝutadi grandajn dosierojn aŭ simile.

## Bieroj en la kongresejo

Trinkejo ekfunkcias ekde hodiaŭ – ĉe la budo de la manĝservo apud la du grandaj tendoj supre – eblas aĉeti tie bierojn, krom kafon, teon kaj etajn lokajn manĝetojn. La servistoj akceptas tie pagon en la tanzaniaj ŝilingoj kaj usonaj dolaroj. Ne estas eblo pagi per karto.

## Kontribuu al *La Voĉo de Kilimanĝaro*

Sendu artikolojn aŭ fotojn al *arusha.kuriero@gmail.com* aŭ venu enmanigi vian kontribuaĵon al la redaktoro en la ĉambro SB-25 ĉe *Simba hall* – en tiu VIP-loko.

## Antaŭkongresaj raportoj



Malkovro de alia mondo: antaŭkongreso ĉe naciaj parkoj kun vizito al triboj

Kia emociplena AK2! Per la aŭto n-ro 7 ni sepope – ses gefrancoj kaj Martina Sachs-Bockelmann kiel interpretistino kaj gvidistino – malkovris alian mondon. Laŭlonge de la vojo al la Lago Manyara, ni vidis plantejojn de kafarboj, kampojn de velkiĝintaj maizoj, serion de sinsekvaj buntaj budoj proponantaj plej diversajn varojn kiel fruktojn, kuiritajn bananojn, rostitajn maizojn, trinkaĵojn, ŝtofojn, artaĵojn… en zumado de motorcikloj, ŝarĝaŭtoj kaj ankaŭ kompreneble de safari-veturiloj!
Tuj ĉe la enirejo de Manyara bonvenigis nin aro da pavianoj petole kurantaj, grimpantaj aŭ serĉante parazitojn unu al la alia. Poste, elstarantaj el vepro kaj densejo peze paŝante elefantoj subite kaj neatendite aperis proksime de nia veturilo. Impresis nin ankaŭ ĝirafoj, impala-antilopoj, kaj pluraj pli-malpli konataj birdoj. Kiom da belegaj imageblaĵoj estis fotitaj tie!
Ĉe la parko Ngorongoro kaj laŭlonge de la vojo, ni preterpasis grupojn de ĉiaaĝaj gelernantoj, kiuj rapidis al la instruejo en sia kolora lernkostumo. Ngorongoro – monda heredaĵo de Unesko – estas unu el la plej famaj naturrezervejoj de Tanzanio. Ĝi estas vasta vulkana kratero kun lagoj, granda ebenaĵo kaj hejmo de kreskaĵoj. Tie atendis nin grandioza sceno: la tuta sovaĝa bestaro de niaj infanaĝaj bildlibroj en sia ĉiutaga vivo – familio de leonoj, du viraj strutoj dancantaj por timigi unu la alian, grandaj kaj malgrandaj gazeloj, antilopoj, zebroj skrapantaj al si la korpon kontraŭ rokojn pro parazitoj, hienoj, fakoĉeroj, gnuaroj, brutoj de bubaloj, diversaj birdoj kiel ardeoj, pelikanoj, grizkronaj gruedoj. Entute la ekskurso okazis laŭplane kaj ni sentis nin bonŝancaj malkovri mirindajn pejzaĝojn kaj fari nekredeblajn renkontojn pri sovaĝaj bestoj kaj triboj en siaj naturaj medioj. Tiuj vizitoj restos neforgeseblaj sentoj!



**Elisabeth Le Drue**, KN 324